

Михаил Лермонтов,
Ангел

По небу полуночи ангел летел,
И тихую песню он пел,
И месяц, и звезды, и тучи толпой
Внимали той песне святой.

Он пел о блаженстве безгрешных
духов
Под кущами райских садов,
О Боге великом он пел, и хвала
Его непритворна была.

Он душу младую в объятиях нес
Для мира печали и слез;
И звук его песни в душе молодой
Остался - без слов, но живой.

И долго на свете томилась она,
Желанием чудным полна,
И звуков небес заменить не могли
Ей скучные песни земли.

...

Михаил Лермонтов,
Anĝelo

tradukita de Vasilij Devjatnin

En mezo de nokto, en blua ĉielo,
Traflugis kaj kantis plej bela anĝelo.
Kaj nuboj kaj steloj kaj lun' en irado
Atentis kun ĝojo je l' sankta kanta-
do.

Li kantis feliĉajn, neniam pekantajn
Spiritojn, kun Di' en ĉielo loĝantajn;
Li kantis pri Patro ĉiela kaj tera—
Kaj lia laŭdado ne estis malvera.

Animon tre junan en brakoj li tenis;
En mondo malgaja naskiĝi ĝi venis.
Kaj sono de l' kanto en juna animo
Restadis sen vort', sed kun viva esti-
mo.

Tre longe en mondo ĝi estis premata,
Je revo mirinda pri Di' plenigata!
Kaj ŝanĝi la kanton de l' sankta sin-
cero
Ne povis por ĝi ĉiuj kantoj de l' tero.

...

Михаил Лермонтов,
La anĝelo

tradukita de Boris Mirski

Kun kanto solena en nokta ĉiel'
Sin portis mirinda anĝel';
Kaj luno, kaj steloj, kaj nuboj en
rond'
Atentis la himnon de l' mond'.

Li kantis pri vivo sen zorga ĉagren'
Sub branĉoj de pura Eden';
Kaj laŭd' al keruboj, al granda Sin-
jor'
Elflugis sincere el kor'.

En brakoj animon li portis al ter',
Al mond' de malĝojo, mizer';
Kaj restis la kanto en juna anim'
Sen vorto, sen unu esprim'.

Kaj plena je stranga, mirinda dezir'
Ĝi vagis en mond' de sopir',
Kaj tedis al ĝi post la kant' de l'
eter'
La veaj motivoj de l' ter'.

...

Михаил Лермонтов,
Der Engel

tradukita de N. N. 98

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas ba-
rita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

Verkinto de tiu ĉi Rusa poemo estas
 МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 –
 †1841-07-27).

Arg-1039-2110 (2014-06-03 12:23:12)

*Pri la poeto Lermontov vidu la rete-
 jon [http://eo.wikipedia.org/wiki/
 Миджаил_Lermontov](http://eo.wikipedia.org/wiki/Миджаил_Lermontov).*

Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de
 МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 –
 †1841-07-27) en Esperanton de VASILIJ
 DEVJATNIN (*1862 – †1938).

Arg-1039-2114 (2014-06-03 12:21:00)

*Pri la tradukinto vidu la vikipe-
 diejon [http://eo.wikipedia.org/
 wiki/Vasilij_Devjatnin](http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin).*

Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de
 МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 –
 †1841-07-27) en Esperanton de Boris
 Mirski.

Arg-1039-2113 (2014-06-03 11:55:42)

*Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas
 en [http://donh.best.vuh.net/
 Esperanto/iteraturo/Poezio/
 lermontov/angxelo.html](http://donh.best.vuh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/lermontov/angxelo.html).*

Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de
 МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 –
 †1841-07-27) en la Germanan de N. N.
 98.

Arg-1039-2112 (2014-06-03 17:30:50)

*Tiu ĉi poem-germanigo tro-
 viĝas en la retejo [http://
 maschas-buch.blogspot.de/2011/
 09/lermontov-der-engel.html](http://maschas-buch.blogspot.de/2011/09/lermontov-der-engel.html). Vi-
 du ankaŭ: [http://home.arcor.de/
 berick/illeguan/lermont1.htm](http://home.arcor.de/berick/illeguan/lermont1.htm).*